

Parto 3:

Esperanto



ESPERANTO EN SVISLANDO (enkonduko)

Kiel konate, la neŭtrala universala lingvo Esperanto (Eo) estis publikigita en somero 1887 en Varsovio, Pollando, tiam Ruslanda Imperio, fare de Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917). En Svislando, la ekdisvastiĝo de Eo fine de la 19a kaj komence de la 20a jarcento koncentriĝis ĉefe al Romandio, la franclingva parto de Svislando. La urbo Ĝenevo, la kantonoj Neuchâtel kaj Vaŭdo povas esti nomataj la luliloj de la svisa Eo-movado. Laŭ *EdEo* kiel unua klopodo ekplanti Eon en Svislando estas konsiderata en 1898 la prelego de →*Alfred Paul Dubois* (1853-1918), instruisto kaj lerneja direktoro en Le Locle/NE. Gravan moralan apogon la Eo-ideo ricevis tiutempe pro la interesiĝo de la eminenta ĝeneva filozofo →*Ernest Naville* (1816-1909), kiu rilatis kun la du lernejoj kolegoj →*Hector Hodler* (1887-1920) kaj →*Edmond Privat* (1889-1962), kiuj starigis en 1903 en sia urbo junularan EK kaj redaktis la revueton *La Junaj E-istoj de Ĝenevo*. La lerneja benko servis al la du junuloj kiel redakcio, kune Hodler kaj Privat administris la agadon, skribis adresojn, korespondadis. Ili komparis la planlingvojn Idiom Neutral de



L. L. Zamenhof

Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917)

Waldemar Rosenberger kaj La Langue Bleue (Bolak) de Léon Bollack por konvinkiĝi, ke Eo estas la plej taŭga planlingva propono. Ankaŭ la studenta unuiĝo *Zofingia* pozitive pritaksis Eon.

Fondo de SES en 1903: Svisa Esperanto-Societo (SES) estis fondita en 1903 kiel dua tutlanda Eo-unuiĝo post la nacia asocio en Francio. La unua oficiala kunveno de SES okazis la 27an de septembro en Rolle/VD. Kiel unuan prezidanton SES povis gajni →*Eugène Failletaz* (1873-1943) el Laŭzano, kiu estis signifa romanda pioniro en industri-komercaj medioj en la vaŭda kanton. En la fondkunveno de SES ĉeestis krom reprezentanto de la ĝeneva kanton (Thiébaud) ankaŭ Théophile Cart (1855-1931), konata Eo-aganto el Francio.


Apud la tutlanda asocio iom post iom estis fonditaj pluraj lokaj grupoj: en Ĝenevo kaj Laŭzano (1903), Bazelo (1905), Berno kaj Neŭŝatelo (1906) ktp. Subite la propagandistoj devis fariĝi gvidantoj de societoj kaj grupoj kaj ekkonsciis pri la komplekseco de la laboro: instrui Eon kaj gvidi kurson, kunordigi la grupan vivon, organizi kunvenojn, redakti gazeton, solvi financajn defiojn, eviti konfliktojn inter la aktivuloj, levi la lingvo-nivelon de la adeptoj, adekvate reagi al la skeptiko kaj kritiko de la neesperantista publiko ktp. ktp.

La forta optimismo de Cart kaj de liaj amikoj respreguliĝis en la kredo, ke la ritmo de la progresoj estos konstanta, kaj ke el cent fariĝos mil e-istoj ktp. Claude Gacond prave atentigis (*SER* 3/1988), ke kiel ankaŭ por ĉiuj aliaj sferoj de la vivo, la ritmo de la kreskado de Eo tute ne estas konstanta. Ĉiu progreso, se ĝi estas sufiĉe signifa, kondukas al nova situacio. Nur la mastrado de la nova situacio povas permesi novajn progresojn. Pri tiu banala vero la venontaj generacioj de SES-anoj ofte devis konscii. Ĉio ĉi klarigas, kial ne povis subite esti mil e-istoj, kiel Cart esperis. Kelkaj tiamaj statistikaj ciferoj donas impreson pri la kvanta progreso de Eo en Svislando en tiu tempo. En februaro 1903 estis nombritaj entute 41 Eo-adeptoj kaj 34 apogantoj. Ĝis decembro 1904 ekzistis en Svislando 85 organizitaj e-istoj kaj 96 aprobantoj. Laŭ la decembra numero de *Svisa Espero* (*SE*) 1906, Eo-revuetu ekaperinta en 1903, la nombro de e-istoj superis 400, dum ekzistis 77 aprobantoj. Fine de 1907 SES publikigis la adresojn de 601 anoj, sen distingi membrojn aŭ adeptojn de aprobantoj. Dum

la postaj jaroj bedaŭrinde ne plu aperis adresaroj. Multaj e-istoj apartenis nur al siaj lokaj grupoj, verŝajne pro kotizaj kialoj. La kotizo de SES, kiu inkluzivis la abonon al *SE*, en 1903 estis du kaj en 1917 tri svisaj frankoj. Por anoj de la burĝa klaso tiu kotizo ne estis tro alta, aliflanke jes por laboristoj kaj simplaj dungitoj ĝi estis relative alta.

Karakterize por tiu periodo estis, ke multaj homoj interesiĝis pri Eo kaj grandnombre ĉeestis publikajn prelegojn pri tiu temo, kvankam nur malmultaj inter ili decidis aliĝi al EG.

Pro troa laboro Failletaz, kiu bedaŭrinde ne fariĝis aktiva e-isto, demisiis kiel prezidanto kaj estis provizore anstataŭita de *Joseph Feierabend* (kiu poste transiris al Ido). Kiel *SE* raportis, la dua ĝenerala kunveno en 1904 en Coppet/VD disvolviĝis en multe pli realisma etoso, ol la fonda kunveno unu jaron antaŭe en Rolle (*SER* 4/1988).



Ernest Naville kaj Auguste Forel

Krom Naville sincere interesiĝis pri la neŭtrala universala lingvo ankaŭ → *Auguste Forel* (1848-1931). Jam en 1902 la emerita kuracisto-psikiatro, sciencisto kaj pacaktivulo esprimis sian opinion pri lingvaj kaj ortografiaj aferoj. Plej malfrue en 1906 li konkrete interesiĝis pri Eo, kiun li eklernetis okaze de la dua Universala Kongreso (UK) de Eo, kiu estis organizita tiujare en Ĝenevo. Forel estis konvinkita, ke la ekzisto de neŭtrala universala lingvo kiel Eo povus akceli la internacian pacon kaj la reciprokan interkompreniĝon. Tial en pluraj verkoj de Forel eblas trovi pozitivan pritakson de la ideo de la neŭtrala universala lingvo kaj rekomendon pri la dezirinda adopto de tia lingvo, ekzemple en *Terminologio kaj mondlingvo* (1902), *Kulturceladoj de la Nuntempo* (1911), *La Vojo al la Kulturo*

(1924) kaj en liaj memuaroj *Rerigardo al mia vivo* (1935). Do Naville kaj Forel ludis iusence la rolon de patriarkoj de la Eo-movado.

Periodo Schneeberger: Nova prezidanto de SES en 1904 fariĝis → *Friedrich Schneeberger* (1875-1926). Ĉi tiu populara protestanta pastoro el Laufen estis ankaŭ konata kiel verva propagandisto de Eo, kiel verkinto de Eo-lernolibroj, kiel redaktoro kaj kunlaboranto de la redakcioj de diversaj Eo-periodaĵoj kaj kiel membro de la Lingva Komitato. En 1905 li partoprenis kun kelkaj aliaj svisoj en la 1-a UK en Boulogne-sur-Mer (Francio), pri kiu li verkis detalan raporton. La postan jaron li eĉ mem prezidis la 2an UK en Ĝenevo, en kunlaboro kun Hodler kaj Privat, tiam gimnazianoj 16- kaj 18-jaraĝaj, kiu rolis kiel kongresaj sekretarioj. (→ Universalaj Kongresoj). Cetere, Hector Hodler estis la filo de la fama svisa pentristo Ferdinand Hodler (1853-1918).


L.L. Zamenhof ege ĝojis pri tiu kongreso, kiun li persone ĉeestis, kaj skribis al Friedrich Schneeberger (2.10.1905): „Kara sinjoro! Kun granda plezuro mi legis en via letero, ke la svisaj e-istoj decidis inviti la II-an kongreson en Svisujon. Tre bone, bonege! Svisujo, kiu, ne havante ian nacian lingvon, estas la plej neŭtrala lando en la tuta Eŭropo, estas la plej bona loko por kongreso neŭtrale-homa, kaj mi esperas, ke tie ĉiuj e-istoj sentos sin bonege. Mi eĉ antaŭvidas, ke venos iam la tempo, kiam Svisujo fariĝos la natura konstanta centro de la tuta e-istaro“ (vd. *O.V.* p. 436). Rigarde al la fondo de UEA du jarojn poste en Ĝenevo, li fakte ne malpravis!



Eugène Failletaz kaj Friedrich Schneeberger

La mondkongreso esence vigligis la Eo-vivon en Ĝenevo kaj rikoltis gravajn novajn adeptojn, inter ili → *René de Saussure* (1868-1943). Li estis la ano de renoma ĝeneva fami-

lio kaj la frato de la fama lingvosciencisto →Ferdinand de Saussure (1857-1913). Ĉi tiu evidente mem estis informita pri la lingvo Eo, kiun li en principo pozitive prikomentis.



Hector Hodler kaj Edmond Privat

Aliaj pioniroj kaj lokaj agadoj: Dum la ro-mandoj esence kontribuis al la unuaj progre-soj de la svisa Eo-movado, en Alemanio komencis labori por Eo kaj SES kelkaj aliaj pioniroj: *Theodor Hopf* (+1919), apotekisto en Thun/BE, eldonis la gvidlibreton titolitan *Tra Oberlando Berna* kaj invitis la e-istojn feriadu en Adelboden/BE. En januaro 1909 en *SE* estis skribite, ke en tiu alpa vilaĝo ekzistas 'esperantujo' (=feriejo) sub la nomo Eldorado. Precizaj informoj aŭ raportoj pri tiu akti-veco mankas. (→Turismo)

Alia feria restadejo instaliĝis en 1908 en Meggen apud Lucerno sub la titolo Internacia Esperanta Paradizo. Evidente ĉi tiu loko fa-riĝis bone vizitata de la svisaj e-istoj. Dank' al la klopodoj de *Emma Herzog* (1857-1920), kiu iniciatis la fondon de loka EG en la sport-kaj kuracloko Davos/GR, ankaŭ en Grizono ekestis Eo-turismo. Alia ebleco por dumferia Eo-praktikado ekzistis en la alpa vilaĝo Châ-teau d'Œx/VD, kie kutimis restadi René de Saussure.

Laŭ *SE* en 1909 ekzistis lokaj EG en Le Loc-le/NE, Neuchâtel, La Chaux-de-Fonds/NE, Huttwil/BE, Lucerno, Ĝenevo, Laŭzano/VD, Davos/GR, Zuriko, Soloturno, Langen-thal/BE, Thun/BE, Rolle/VD, Nyon/VD, Morges/VD, Yverdon/VD, Begnins/VD, Berno, Münsingen/BE kaj Thalwil/ZH.

La revuo *Vespera Horo*, modele redaktita kaj eldonita de →*Friedrich Uhlmann* (1881-1938) dum 1910 en Huttwil, raportis ankaŭ pri grupagadoj en St. Gallen, St. Moritz/GR, Rheinfelden/AG, Olten/SO, Glarus, Ror-schach/SG, Kreuzlingen/TG, Liestal/BL, Zofingen/AG, Zug, Sumiswald/BE, Burg-

dorf/BE, Château d'Œx/VD kaj Ste-Croix/VD. *SE* 10/1916 raportis, ke Svislando havas 343 anojn de lokaj EG kaj 114 izolu-lojn.

Periodo de Saussure: En 1908, fone de la Ido-skismo (→Ido en Svislando), prezidanto Schneeberger senkulpiĝis por la SES-jarkunveno kaj anoncis, ke li preferas la Ido-movadon. Post la demisio de Schneeberger, la mirigitaj SES-anoj trovis anstataŭulon en la personeco de la jam menciita →René de Saussure el Ĝenevo. La matematikisto kaj malpli konata frato de la eminenta lingvo-sciencisto vigle interesiĝis pri Eo en 1906 pro la dua UK en Ĝenevo kaj pretis disponigi konvenan infrastrukturon por la juna Eo-movado. En aparta oficejeto ludonita de de Saussure en la strato Bovy-Lysberg 8 estis administrata Internacia Scienca Asocio E-ista (ISAE) kaj redaktata *Internacia Scienca Re-vuo*, sed ankaŭ la revuo *Esperanto*, kaj tie troviĝis ankaŭ la unua oficejo de UEA, kiu estis fondita en 1908. La SES-organon *Svisa Espero* li redaktis (kaj financis) en la jaroj 1909-10 kaj 1916-18.




Friedrich Uhlmann kaj René de Saussure

La apero de la reformprojekto Ido (1907/08) kaj la ĝin akompanantaj esperantologiaj diskutoj instigis de Saussure science analizi la teorion de la Eo-vortfarado. Per sia studo *La construction logique des mots en Espéran-to* (1910), kiu estas agnoskita kiel ĉefverko, li faris gravan kontribuon al esperantologio. Sed kiam li sentis, ke li ne plu posedas la centprocentan fidon de la e-istoj, ĉar li ko-mencis sugesti reformojn en la lingvo Eo (projekto Antido), li ofertis en 1911 sian demision kiel SES-prezidanto, avertante, ke li neniel celas malhelpi la zamenhofan aferon kaj ke oni miskomprenis liajn intencojn koncerne la celon de lia scienca analizado de Eo.

La prezidantan torĉon li transdonis al →*Eduard Stettler* (1880-1940), alia grava funkciulo de UEA.

Al la kuraĝo kaj kapablo de René de Saussure, Jakob Schmid, Jules Perlet, Eduard Stettler kaj aliaj oni dankas la preparadon kaj realigon de la 9a UK en 1913 en Berno, do de la dua internacia Eo-kongreso en Svislando. La oficon de la alta protektanto bonvolis transpreni elstara figuro de la tiama politika kaj publika vivo: nome kolonelo →*Emil Frey* (1838-1922), prezidinto de la Svisa Konfederacio en 1894 kaj oficanta direktoro de la centra oficejo de la Universala Telegrafa Unio. Al la kongresanoj Frey direktis brilan salut-paroladon, en kiu li certigis sian varman subtenon de la neŭtrala universala lingvo (→Antologio). Frey perfekte komprenis la ideojn kaj celojn de la movado por neŭtrala universala lingvo, kiun li envicigis inter la grandaj sociaj movadoj. Tial li ne hezitis eldiri al la ĉeestanta ‘majstro’ L.L. Zamenhof siajn dankemon kaj admiron por lia granda verko. Ĉar Frey estis samtempe honora prezidanto de *Verband für die Schaffung eines Weltsprache-Amtes*, kiu estis iniciatita de idistoj, li troviĝis en iom tikla situacio kaj estis devigita proklami sian neŭtralecon en la konflikto inter e-istoj kaj idistoj. (→Ido en Svislando).



Emil Frey kaj Jakob Schmid

Inter majo 1912 kaj julio 1914 *Svisa Espero* aperis komune kun aŭ kiel integra parto de la *Monda Poŝto / Weltpost*, gazeto kiu en 1909 iĝis la oficiala organo de la t.n. Internacia Ligo (Monda Ligo). Ĉi tiu profesiaspekta periodaĵo estis redaktata de *Jean Thalmann* en Fischbach/ZH kaj kune kun *SE* liverata al la membroj de SES. Ĝi ĉefe okupiĝis pri kolektadaj aferoj (precipe poŝtmarkoj) kaj havis ankaŭ priesperantan propagandan parton. (→Ĵurnalismo, ĵurnalistoj).

La eksplodo de la unua mondmilito interrompis grandparte la Eo-agadon, en Svislando kaj internacie. En sia raporto pri la historio de la zurika ES, Emil Müller skribis: „Nature, la militkomenco komplete haltigis la movadon. Ĉiu havis siajn proprajn zorgojn kaj mankis la tempo kaj emo labori por idealaj celoj.“

1920aj jaroj / periodo Privat: Inter 1921 kaj 1927 la svisa Eo-movado estis reorganizata de →*Edmond Privat* (1889-1962) kaj SES gvidata de li kiel prezidanto. La agado de ĉi tiu supozeble plej signifa ĝeneva kaj svisa e-isto meritas apartan atenton. La specifaĵo de Privat estis, ke li kiel ĵurnalisto, universitata instruisto, pacaktivulo kaj mondvojaĝanto estis iom konata en diversaj publikaj medioj, en kiuj li samtempe kaptis la okazon paroli pri Eo. Ĝuste en Ĝenevo dum la 1920aj jaroj disvolviĝis kadre de →Ligo de Nacioj la memorindaj diskutoj pri Eo, dum kiuj la firma malamiko de Eo →*Gonzague de Reynold* (1880-1970) rigide kontraŭstaris ajnan provon agnoski Eon, celante misfamigi ĝin kiel „barbaran lingvon“. Malgraŭ la historio de Gonzague de Reynold kontraŭ Eo, kaj dank’ al la klopodoj de Privat, Eo akceptiĝis de Ligo de Nacioj kiel laborlingvo almenaŭ en telegrafio kaj iĝis instruata fako en la beletra fakultato de la ĝeneva universitato (1928/29). En 1923-28 Privat oficis kiel prezidanto de la Internacia Centra Komitato (ICK), en 1925 ankaŭ kiel prezidanto de UEA. Privat verkis la unuan historiografian libron pri la frua Eo-movado (ĝi aperis en 1912 resp. 1927) kaj la unuan biografion de L.L. Zamenhof (1920). De la agado kaj prestiĝo de Privat la ĝeneva kaj svisa Eo-movadoj ricevis kompreneble multajn impulsojn kaj do povis profiti, neripeteble en postaj jaroj.



Gonzague de Reynold (1922) kaj Edmond Privat, la kontraŭuloj en Ligo de Nacioj

Konsiderindan subtenon por la Eo-varbado kaj tre fervoran kunorganizanton de fakaj konferencoj pri Eo Privat trovis en la signifa ĝeneva pedagogo → *Pierre Bovet* (1878-1965), alia romanda admiranto de la zamenhofa idealo. Bovet rekomendis Eon unuavice kiel lingvon por propedeŭtikaj celoj. En siaj klopodoj atingi ĝian internacian agnoskon kaj vastskalan enkondukon en la lernejojn, Bovet verkis plurajn studojn, prelegojn kaj broŝurojn pri la temo. Lia Instituto Jean Jacques Rousseau kaj la Internacia Oficejo por Edukado, kiujn Bovet direktis en Ĝenevo, iniciatis kaj kunvokis du historie gravajn konferencojn pri la Eo-instruado: la unua okazis en 1922 kaj estis aŭspiciata de la sekretario de Ligo de Nacioj (Palaco Wilson) en Ĝenevo; la dua efektiviĝis en 1927 en Prago. Ankaŭ la internacia kongreso de la Universala Federiĝo de la pedagogiaj asocioj, kunveninta en Ĝenevo en 1929, envicigis Eon inter la laborlingvojn. En 1925 Bovet iniciatis ankaŭ, okaze de la ĝeneva UK, la Someran Universitaton en Eo. Krom Bovet mem prelegis en ĝi elstaraj sciencistoj, inter ili → *Charles Baudouin* (1893-1963), kiu tiam estis renoma psikoterapiisto, filozofo kaj verkisto.



Pierre Bovet kaj Charles Baudouin

Krom en tiuj menciitaj fakmedioj, diversloke funkciis grupoj de laboristaj e-istoj, kaj estis fonditaj ankaŭ EG kadre de komercaj societoj. Dum la komercistaj Eo-rondoj poste malaperis, la laboristaj e-istoj unuiĝis en Svislando ĝenerale kun la ceteraj e-istoj por havi nur unu ES en ĉiu svisa urbo.

1930aj jaroj: Privat meritoplene demisiis kiel SES-prezidanto en 1927, trovinte sian taŭgan posteulon en la persono de la jam menciita → *Eduard Stettler* (1880-1940). Ĉi tiu berna burĝo jam prezidis SES inter 1911 kaj 1913 kaj estis simile kiel Privat nedisigeble ligita

kun la konstruado de UEA en Ĝenevo, al kiu li apartenis de la komenco kiel vicdirektoro, poste direktoro de UEA (1910-24) kaj prezidanto (1927-34).



Eduard Stettler kaj Eduard Spielmann

Gravan kontribuon al la Eo-varbado en Svislando alportis ankaŭ → *Eduard Spielmann* (1870-1938) kun ties → *Svisa Eo-Instituto*, fondita en 1933 en Berno. Ĉi tiu instituto fariĝis vera centra oficejo de la svisa Eo-movado kaj disvolvis nekutime vastan propagandan kaj informan aktivecon. Nelaste ĝi helpis firme defendi Eon kontraŭ la planlingva konkurenco flanke de Occidental kaj Ido, kiuj iom furoris tiutempe. Kun la morto de Spielmann en 1938 silentiĝis ankaŭ lia instituto, kiu tamen povis esti restarigita de *Hanni Fischer-Buri* (1894-1961) en la 50aj jaroj. En 1936 la ŝatata hungara poeto Gyula-Julio Baghy (1891-1967) vizitis Svislandon kaj prelegis en la EG de St. Gallen, Zuriko, Berno, Neuchâtel, Morges kaj Ĝenevo pri la Eo-literaturo, recitis poemojn de Kálmán-Kalomano Kalocsay (1891-1976) kaj de si mem kaj vendis librojn - bonvena okazo altigi la kulturen nivelon de la svisaj e-istoj, kiuj tendencis tro atenti nur la aspektojn propagandan kaj informan. Eo-ekzamenoj estis organizataj kadre de la jarkunvenoj de SES. En 1936-37 survojis en Svislando, kadre de vojaĝo tra 12 eŭropaj landoj, ankaŭ la denaska sviso → *Joseph R. Scherer* (1901-67), kiu lernis Eon en 1922 en Lucerno kaj kiu en 1924 elmigris al Usono. Jam en 1930-32 Scherer entreprenis mondvojaĝon tra 43 landoj kiel speciala delegito de la Internacia Centra Komitato (ICK, Ĝenevo). Liajn publikajn prelegojn, kiujn tra la radiokanaloj devis aŭdi centmiloj da personoj, servis por pruvi la praktikan taŭgecon de Eo. Dum sia restado en Svislando Scherer estis invitita de la lokaj EG en Zuriko, Lucerno, Berno, Morges, Soloturno, Herisau, Thun, St. Gallen kaj Wattwil.



Hungaroj Baghy, Kalocsay, Cseh

Do en la 1930aj jaroj funkciadis dudeko da pli malpli grandaj EG. Krom la supre menciitaj ekzistis ankaŭ tiuj en La Chaux-de-Fonds, Le Locle, Biel-Bienne, Gossau/SG, Aarau, Olten/SO, Einsiedeln/SZ, Herzogenbuchsee/BE, Kreuzlingen/TG, Wattwil/SG, Gersau/SZ. Kiel faka grupo aktivadis ekde 1925 *Svisa Asocio de Eo-Fervojistoj* (SAEF), la svisaj *kristanoj* kolektiĝis kadre de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista (IKUE, fondita en 1910) kaj de Kristana Eo-Ligo Internacia (KELI, starigita en 1911-13).

Movada dueco UEA-IEL: En la 1930aj jaroj la novaj UEA-gvidantoj sub la prezido de la franco Louis Bastien ordonis rigoran ŝparadon en sia asocio. Aperis la ideo de translokiĝo de la Centra Oficejo al Britio, kie la masstrumaj elspezoj estis malpli altaj ol en Ĝenevo. Krome estis proponite, ke la UEA-biblioteko, deponita en Palaco Wilson en Ĝenevo, migru al la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kaj la propaganda sekcio transiru al Stokholmo. Ĉi tiuj planoj rapide vastiĝis al konflikto inter la UEA-organoj kaj →*Hans Jakob* (1891-1967) en Ĝenevo kaj finfine postlasis ankaŭ spurojn en la svisa Eo-movado, en kies rondoj aperis protestoj kontraŭ diktitaj decidoj de Bastien. Jakob kaj aliaj kontraŭstaris la planojn de UEA kaj eĉ lanĉis jurprocezon antaŭ la ĝeneva juĝejo. Ĉar repacigaj klopodoj dum la viena UK en 1936 fiaskis, la UEA-estraro vidis nenium alian eblon ol starigi novan organizon. La 18an de septembro Bastien anoncis la fondon de Internacia Eo-Ligo (IEL) kun sidejo en Britio. Per tiu ago la internacia Eo-movado estis perfekte dissplitita. (→Universala Esperanto-Asocio)

Preskaŭ la tuta internacia Eo-movado aliĝis al la nova asocio. Dum la SES-anoj kun ĉagreno protestis kontraŭ la planoj de UEA translokiĝi la oficejon de UEA al eksterlando kaj en 1937 ankoraŭ rifuzis aliĝi al IEL, la sinteno en 1938 ŝanĝiĝis. Okaze de ĝia jarkunveno en

Biel-Bienne la SES-anoj decidis per baloto fariĝi landa asocio de IEL kaj adapti sian statuton al la novaj cirkonstancoj. (→Svisa Eo-Societo). Post tiu rimarkinda paŝo, Berno kiel ĉefurbo de neŭtrala ŝtato estis bonvena al IEL kiel kongresloko por la 31a UK en 1939. (→Universalaj Kongresoj)


La ekonomia krizo fine de la 1920aj, komence de la 30aj jaroj ĝenerale malfavore influis la situacion de la entreprenoj kaj ankaŭ ŝanĝis la pensmanieron de la homoj rilate idealismajn movadojn. Ankaŭ la tro fruaj konkludoj de iuj instancoj aŭ amaskomunikiloj, kiuj distrumetis la fiaskon de Eo, kondukis al konfuziĝo en la Eo-movado. Ekzemple en 1932, la jaro de la Eo-kursoj de Tiberiu Morariu (1901-87) kaj Andreo Cseh (1895-1979), la direkto de la Svisaj Fervojoj nuligis la statuson de la samrajteco de la Eo-kursoj por fervojistoj kun la argumento, ke „Eo kiel monda helplingvo ne atingis la disvastiĝon, kiun oni komence atendis de ĝi“.



Hans Kürsteiner kaj Edouard Waldvogel

La dua mondmilito, kiu eksplodis tuj post la berna UK kaj kiu feliĉe ne trafis la neŭtralan Svislandon per detruo kaj fizikaj suferoj, ĉesigis ĉiujn normalajn internaciajn rilatojn kaj disigis tiom da homoj en la militantaj landoj de iliaj parencoj kaj amikoj. La kruela persekutado de la e-istoj en stalinisma Sovetunio kaj nacisocialisma Germanio silentigis la lokajn movadojn. La milito ankaŭ preskaŭ tute haltigis la laboron de la ĝeneva oficejo de UEA, kiu limigis sian agadon al la t.n. E-ista Interhelpo. En kunlaboro kun la Ruĝa Kruco ĉi tiu servo estis starigita unue por subteni viktimojn de la nacisocialismo kaj milito, poste por organizi la serĉadon de perditaj e-istoj kaj por mildigi la sorton de internigitaj e-istoj en militkaptejoj en Francio kaj aliaj landoj. Tiuj agadoj disvolviĝis parte en kunlaboro kun →*Edouard Waldvogel*

(1893-1994), eklezia aganto en Estavayer-le-Lac/FR.



Alfred Bader kaj Arthur Baur

Sentante la politikan premon en Eŭropo, →*Hans Kürsteiner* (1885-1968), prezidanto de la malnova UEA inter 1942 kaj 1947, admonis tra *SE* (1/1937) la e-istojn ne adaptiĝi al unu el la regantaj mondkonceptoj, ĉu faŝista, ĉu bolŝevista. Ankaŭ →*Marcel Jaccard* (1902-73), prezidanto de SES inter 1939 kaj 1942, publike meditis en *SE* pri kiel aspektos la mondo post tiu kruela murdorgio. En siaj modele kaj vizie verkitaj artikoloj pri la aktuala situacio de la mondo (vd. ekz. *SE* 2/1939) Jaccard kredis esti malkovrinta unu gravan kialon por la aktuala civiliza malordo en la cirkonstanco, ke la nuntempoj ankoraŭ ne sukcesis plene adaptiĝi al la kondiĉoj de la maŝina kaj industria revolucio de la 19a jarcento. En posta eldono de la revuo li esprimis la esperon, ke la popoloj ekkonscios pri la krimeco kaj senutileco de tiu nova milito kaj ke la postmilita mondo devus esti reorganizita sur nova fundamento por atingi daŭran pacon. Kvankam Jaccard restis skeptika pri la sincereco de politikistoj parolantaj pri paco, li laŭdis la klopodojn de la eŭropaj federalistoj, favore menciis la sperton de usonanoj kaj svisoj kun ilia sukcesa politika federalismo kaj nelaste atentigis pri la rimarkinda kontribuo de la e-istoj al la praktikado de solidareco kaj interpopola interkompreniĝo, kiuj estus aplikataj en la klopodo por la paca konstruado de la nova epoko.

Sub la titolo ‘Kion la milito alportos al Eo?’ la tiam juna ĵurnalistino →*Arthur Baur* (*1915) prikonsideris en *SE* 4/1940 kelkajn eblajn scenarojn de la milito por Eo. Baur aperigis en 1939 la →*Svisan Antologion*, kiu estis grava literatura-kultura kontribuo de la kongresa jaro. Samtempe Baur lanĉis la nacilingvan gazetan servon *Esperanto-*

Information, kiun li kompetente daŭrigis dum jardekoj. Kiel iam Privat, Baur reprezentis SESn en la Svisa Packonsilio kaj en la Svisa Unesko-Komisiono. Al la demando kio do okazos, se Germanujo venkos, Baur respondis en sia artikolo, ke sub la regado de germana Paneŭropo plej verŝajne la germana lingvo ludos gvidan rolon, dum la angla lingvo estos ekster la konsidero kaj la franca kondamnita al negraveco. Lia konkludo iris en tiu direkto: Ĉar la germana registaro persekutis la e-istojn en sia lando, ilia lingvo supozeble ne havos lokon en la Tria Regno. Aliflanke, se Anglujo venkus, eblas antaŭvidi, ke la angla lingvo akiros novan povon. Kaj ĉar la angloj neniam malpermesis Eon, la zamenhofa idiomo verŝajne konservos sian lokon, kiun ĝi ĝis nun povis okupi, nome ludi la rolon de internacia interkomprenilo.

Okaze de la jarkunveno en La Neuveville en 1942, Edmond Privat prelegis pri la historio de la federalismo en Svislando, Usono kaj Ligo de Nacioj (lia ĉi-tema libro aperis en 1958). Privat estis ankaŭ la ĉefa organizanto de la Svisa Eo-Tago en Ascona kaj Locarno en Tiĉino (1943) kaj la ĉefpreleganto de la unua postmilita kongreso en Montreux en 1945. Lia kolego Pierre Bovet, bone konata al la e-ista publiko el la 1920aj jaroj kiel fakulo pri pedagogiaj kaj lerneja aferoj, prelegis dum la Svisa Eo-Kongreso en Hertenstein/LU en la sama jaro.



Edmond Privat kaj Marcel Jaccard

Kiel jam dum la unua mondmilito, kiam la Eo-propagando okazis en militkampoj por internigitaj eksterlandaj soldatoj en Thun kaj Caux, ankaŭ nun en la militendaroj de Girenbach apud Hinwil/ZH, en Wald/ZH, Büren a.d.A./BE (kie troviĝis pola kolonio) k.a. disvolviĝis Eo-kursoj. Kun la helpo de Sveda Eo-Federacio SES komencis eldoni perkorrespondajn kursojn, kaj kun UEA estis aperigitaj la germanaj *Eo-ŝlosiloj*. Vicprezidanto

Martin Ardüser (1917-43), reprezentis SES en la mondlingva komitato de Eŭropa Unio. En 1943 la laboristaj e-istoj malakceptis kunfandiĝon kun SES, laŭ konsilo de Kürsteiner. En la sama jaro, dank' al la profesia ĵurnalisto →*Hans-Joachim Unger* (1894-1984), reaperis la gazetara servo de SES, kies publikaĵoj dissendiĝis al gazetoj, politikistoj, sciencistoj kaj industriaj medioj. Pro tiu agado en 1944 en la nacilingva gazetaro aperis pli ol 150 artikoloj.

„La muroj falu!“ sonis la slogano tra *SE 6/1945*, kiu solene distrumpetis la militfinon kaj anoncis, ke la svisa poŝto denove akceptas kaj ekspedas presaĵojn, leterojn kaj telegramojn interŝanĝe kun eksterlando, ekzemple Britio, kaj ke la rilatoj kun Francio restariĝis – aferoj tiom gravaj por la refunkciado de normalaj internaciaj kontaktoj ankaŭ por e-istoj. *Pensoj de Zamenhof*, broŝuro kompilita de la bazela kuracisto →*Alfred Bader* (1889-1968) kaj prezentanta la homaranismajn ideojn de la majstro en Eo, en la franca, germana, itala kaj angla lingvoj, estis eldonita de SES ĝustatempe je la delonge sopirata fino de la mondmilito.

La kulminaj eventoj de la svisa Eo-movado en la jaroj post la milito estis la Eo-instruado de Andreo Cseh en St. Gallen (1946), la kursoj de Julia Isbrücker, konata nederlanda e-istino el Hago, en la Pestalozzi-infanvilaĝo en Trogen/AR (1947), la starto de la Eo-radioprogramoj de la kurtonda *Svisa Radio Internacia (SRI)* kun Edmond Privat kaj Arthur Baur (1946/47, →Radio) kaj la eldono de la libroj *Ĉe la sanktaj akvoj* de J.C. Heer kaj *Du amosentaj noveloj*, entenanta *Imenlago* de Theodor Storm kaj *Maruška* de Mela Escherich (1947), en la traduko de Alfred Bader. En tiu periodo estis organizitaj ankaŭ pluraj regionaj kunvenoj kaj daŭrigitaj la lingvaj ekzamenoj de SES kun disdono de diplomoj.



Hans-Joachim Unger kaj Hans Jakob

Pro la bonaj rilatoj kun IEL kaj la malnova UEA samtempe SES povis organizi la unuan postmilitan UK en Berno en 1947 (→Universaliaj Kongresoj). Ĉi tiu semajno kondukis ankaŭ al la longe sopirata kontrakto pri reunuigo de la du ĉeforganizoj de la Eo-movado, surbaze de interkonsento en julio 1946 en Berno. Apud la Administra Centro en Britio, la oficejo de Hans Jakob en Palais Wilson en Ĝenevo alprenis la titolon de Serva Centro de UEA kaj estis taskita redakti la asocian organon *Esperanto*, prizorgi la UEA-bibliotekon ktp.

1950aj jaroj: La unua duono de tiu jardeko estis plene dominata de la internacia Eo-peticio al Unesko. Fine de 1949 la peticio estis subskribita de 492 internaciaj kaj naciaj organizaĵoj, kiuj reprezentis kune 15'454'780 membrojn. Krome la peticio estis subskribita de 895'432 unuopuloj en 76 landoj. Sekve la peticio estis ekzamenita de Unesko kaj pludelegita al la membroŝtatoj.

Tre malvarman duŝon la svisaj e-istoj ricevis en 1953. En tiu jaro SES la Svisa Departemento pri internaj aferoj sendis al SES la kopion de *Raporto pri la enketo rilate la internacian peticion favore de Eo en Svislando*. Tiu ĉi raporto, kiu konkludis ekstreme negative pri Eo, celis esprimi la sintenon pri Eo flanke de 22 svisaj kantonoj kaj 27 aliaj gravaj organizaĵoj kaj institucioj i.a. el la medioj banka, kamparana, turisma, komerca, instruista, scienca, jurista, ĵurnalista, virina, sindikata. Laŭ la farita enketo ĉiuj kantonoj krom Neuchâtel kategorie neis, ke ili favorus aŭ dezirus favori la instruadon de Eo en la publikaj lernejoj kaj malatribuis al tiu lingvo, ke ĝi iam ajn povos ludi la rolon de mondlingvo aŭ akiri signifon en internaciaj rilatoj. Kiel argumentoj servis, ke en Svislando pere de Eo ne ekzistas laborlokoj, kaj la aserto, ke krom en la kazo de kelkaj etaj grupoj, Eo ne estas praktikata en Svislando. Tial la svisaj aŭtoritatoj taksus neŭtralan universalan lingvon kiel Eo nenecesa kaj ne kredus, ke tia lingvo konsiderinde faciligus la rilatojn inter la popoloj aŭ ke ĝi akcelus la socian progreson.

Leginte tiun raporton, la SES-anoj devis esti profunde ŝokitaj. En sia responda letero, subskribita de Werner Laederach la 23an de junio 1953 al la koncerna ministerio, SES emfazis la bedaŭron, ke la ministerio disvastigis tiajn negativajn konkludojn pri Eo. Emfazante sian pozicion, SES skribis, ke ĝiaj membroj pridubas la seriozecon kaj utilecon

de tiu raporto kaj riproĉis al la verkintoj de la raporto, ke ili traktis la Eo-demandon tute unuflanke, sisteme prisilentante la pozitivajn faktojn. Eĉ la Eo-radioelsendoj ĉe Svisa Radio Internacia ne estis menciitaj, kiuj estis produktitaj ekde 1946, nek la Eo-kursoj en la zurika popola lernejo, nek la universalaj kongresoj jam kvarfoje okazintaj en Svislando. Same estis ignoritaj en tiu raporto la ekkonoj kaj argumentoj de Ernest Naville kaj Auguste Forel, Pierre Bovet aŭ Edmond Privat favore al Eo. SES skribis, ke la analizo flanke de la ŝtato ne estus sufiĉe objektiva kaj la konkludoj plenaj de antaŭjuĝoj kontraŭ Eo. Tiel verkita raporto disponigus al Unesko sole teoriajn opiniojn de unuopa deklarita kontraŭulo de Eo, ne pli.

Sub tiuj iom malfavoraj kondiĉoj tamen povis esti instalita sine de la Svisa Nacia Biblioteko (instalaĵo de la Departemento pri internaj aferoj!) en Berno ekspozicio pri Eo, kiu estis sub la aŭspicio de SES kaj de la berna EG. La ekspozicion aranĝis Arthur Baur, kiu tiam laboris kiel redaktoro de *Berner Zeitung*. En SE 5/1953 aperis detala raporto pri la ekspozicio, kiu konsistis el vitrinoj, prezentantaj ĉirkaŭ 300 ĉefe presitajn Eo-dokumentojn, kaj kiu estis vizitebla de la 19a de oktobro ĝis la 9a de novembro 1953.



William Perrenoud, Hanni Fischer-Buri kaj Arnold Bohren

La 2an de junio 1954 SES povis aranĝi aŭdiencon ĉe la prezidanto de la Svisa Federacia Konsilio (svisa registaro), Max Petitpierre (1899-1994), en Berno. La SES-delegacio, kiu atentigis la ministrojn pri la graveco de la montevidea Unesko-rezolucio favore al Eo, konsistis el →William Perrenoud, René Zollinger, →Bruno Graf, →Tina Peter-Rüetschi kaj →Heidi Baur, krome ĉeestis Henri Perret, prezidanto de la Svisa Nacia Konsilantaro (parlamento), kaj Hans Buchli, eksa direktoro de la turisma oficejo en Berno kaj kunorganizinto de la lastaj du UK.

Kiel konate, la dirita peticio kondukis al la fama Eo-rezolucio IV.1.4.422 de Unesko de la 10a decembro 1954, surbaze de kiu UEA ricevis la konsultan statuson ĉe tiu mondorganizo. Interesa detalo lige kun la aprobo de tiu rezolucio estas, ke la estro de la svisa Unesko-delegacio, Pierre Bourgeois (1897-1971), en 1953 estis ankaŭ la direktoro de la Svisa Nacia Biblioteko, en kiu okazis la ekspozicio pri Eo. Kiam en Montevideo en la unua voĉdono pri la Eo-rezolucio de Unesko la plimulto de la ŝtatoj voĉdonis kontraŭ, ankaŭ la svisa delegacio sekvis tiun ekzemplon. Sed kiam en la dua, ĉi-foje sukcesa voĉdono la plimulto de la ŝtatoj voĉdonis jese, ankaŭ Bourgeois agis same. Ĉar Bourgeois respondecis pri la arkivaĵoj de Gonzague de Reynold, li eble eksciis pri lia negativa sinteno rilate al Eo, kiun la friburga intelektulo siatempe praktikis en Ligo de Nacioj. En 1954 SES povis ekorganizi kulturalan ferian aranĝon en la →*Kastelo Münchenwiler* apud Murten. Tio signifis por la e-istoj „signon pri la kreskanta signifo kaj rekono de Eo“. Ĉi tiu ejo estis uzata de la berna kantono cele al la kultura klerigo de ĝiaj civitanoj. En la kastelo nun ĉiusomere efektiviĝis la internaciaj feriaj kursoj de SES kun prelegoj de →William Perrenoud pri →geonismo kaj lingvoinstruado laŭ →La ora metodo. Krome ĉi tie okazis ankaŭ la ekzamenoj de SES kun disdono de diplomoj (atesto pri lernado kaj supera diplomo) kaj realiĝis regionaj kunvenoj de SES kaj la KELI-kongreso en 1957. La morto de Hanni Fischer-Buri en oktobro 1961, kiu en novembro 1954 restarigis la →*Svisan Eo-Instituton*, praktike ĉesigis la kursojn en Münchenwiler kaj la aktivecon de la instituto.



Werner Laederach, Fritz Liechti kaj Tina Peter-Rüetschi

En 1951 ekorganizigis la *Junular-Sekcio de SES*, kiel reago al la progresanta maljuniĝo de la pionirgeneracia aktivularo, kiel oni klarigis. Kun la celo praktike uzadi Eon estis organizitaj la *skiferioj en Adelboden*. Ĉi tiu aranĝo pasis 21 fojojn ĝis 1978. La ĉefaj


motoroj de tiu junularsekcio nomiĝis →*Bruno Graf* (*1928), →*Hans Herrmann* (1926-2002), →*Max Abegg* (*1937) kaj →*Claude Gacond* (*1931). En 1956 la gejunuloj organizis la unuan svisan Eo-junularan semajnfiron en Soloturno, kiu malgraŭ modesta nombro de partoprenantoj tamen evoluis pozitive ĉefe pro la ĉeesto de la ‘maljunuloj’ Perrenoud, Zollinger kaj Gillard. Ankaŭ Edmond Privat, la pioniro de la unua generacio, kaj →*Arnold Bohren* (1875-1957), iama direktoro de la Svisa Akcidenta Asekurejo (SUVA), aktive subtenis la klopodojn de la gejunuloj kaj garantiis al ili moralan kaj financan subtenon.

Alia iom prestiĝa agado de svisaj e-istoj estis la t.n. *Koordinataj Eo-kursoj (KEK)* en la zurika (kaj berna) popolaltlernejo. La koncepton iniciatis →*Tina Peter-Rüetschi* (1904-93), kunlabore kun →*Werner Laederach* (1912-2002), kiu gvidis la kursojn, kaj →*Fritz Liechti* (1913-2001), kiu pretigis la instrumaterialon. Tiuj kursoj okazis ĝis 1961 eĉ kun internacia partopreno. Malgraŭ tiuj evidentaj sukcesoj, la SES-responsulo Bruno Graf montris sin malkontenta pri la aktuala stato de la svisa Eo-movado. En *SE*, jarkolekto 1954, sub la titolo „izoleco eksmoda“ li trafe analizis la aktualan situacion. Li bedaŭris, ke la Eo-movado havas enorman penon trovi kapablajn gvidantojn, kiuj devus krei en la societa vivo la spiritan nivelon, kiu estus nepre necesa en kleraj rondoj. Precipe la intelekta izoleco de la enlanda Eo-movado ŝajnis al Graf malhelpi la kreskadon de la tutsvisa societo. Li ja sentis, ke la nura propagando por la lingvo ne sufiĉas. Laŭ Graf la e-istoj devus eniri ĉiujn internaciajn forumojn kaj tie konkrete defendi sian proponon de la solvo de la internacia lingva problemo, demonstri al la homoj kiun rolon Eo povus ludi en la praktika vivo, sub la kondiĉoj de kreskanta internaciismo kaj universalismo. Graf kritikis ankaŭ la validan organizan strukturon de SES, kiu laŭ lia opinio havas maltaŭgan karakteron. Praktike nur Eo-parolantaj personoj aliĝus al la asocio pro tio ke la oficiala organo *SE* aperas por konataj kaŭzoj nur esperantlingve. Laŭ Graf tiu sistemo fortenus de SES ĉiujn simpatiantajn elementojn, kiuj eventuale povus esti utilaj al la afero de Eo. Menciante la gazetaran servon *Esperanto-Information*, modele pretigitan de Arthur Baur, Graf sugestis la kreon de analoga nacilingva informservo por la amikoj de Eo.

La kronikisto (W. Perrenoud) konfirmis tiun stagnan impreson en sia jarraporto aperinta en *SE* 2/56 per la klarigo, ke povas esti, ke la tradicia formo de periodaj „grupaj kunsidoj“ ne plu konformas al la nuntempa stato de la aferoj. Necesus do serĉi ion pli spontan, malpli formalan kaj rigidan, ion pli diversecan kaj allogan. Por ke „la spirito movu la materion, la koroj devas bati vigle, la intelektaj interesoj devas esti vekitaj, la individuoj ne devas esti egoiste sur si mem fermitaj. Tial falu la mallarĝanimaj ĉirkaŭbaroj kaj regu la bonvolo kaj la homeco!“

Nu tia kritiko ne estis nova. Ekzemple jam en *SE* 1/36 ĉi-koncerna plendo laŭtiĝis pro nesufiĉa subteno flanke de la e-istaro rilate la abonon de la societa organo kaj la utiligon de la asociaj servoj. En 1947 estis aŭdeblaj similaj bedaŭroj pri la danĝera stagnado de la lokaj EG. Kaj kiam Bruno Graf post longa movada foresto en 1997 revenis kiel prezidanto de SES, lia analizo de la svisa movado sonis fakte tre simile kiel en 1954.

La stagna periodo povis esti iom ekvilibrigita per novaj promesplenaj agadoj, plej ofte nedependaj de SES rekte. Ekzemple →*Marcel Erbetta* (1911-96), instruisto en Biel-Bienne kaj aktivulo en la movado de la Freinet-pedagogio, lanĉis en 1956 sian projekton de la tutmondaj interlernejaj rondoj →*Graĵoj en vento* kun la celo akceli la kulturen interesanĝon inter gelernantoj kaj progresigi la instruadon de Eo en la bazaj lernejoj.



Charles Ecabert kaj Marcel Erbetta

Lige kun la klopodoj pri instruado de Eo estas interese atentigi pri kontaktoj de kelkaj svisaj Eo-instruistoj kun diversaj pedagogiaj movadoj kaj ties ĉefaj reprezentantoj, kiuj interesiĝis pri eksperimentoj kun neŭtrala universala lingvo, unuavice Eo. La rolo de Pierre Bovet estis priskribita jam pli frue. Fakte Graĵoj en vento en la 1960aj jaroj estis unu el la fruktoj de la pedagogio de la franca instruisto de popollernejoj kaj reformpedagogio Célestin


Freinet (1896-1966). Inter aliaj agadoj Erbeta organizis en julio 1958 internacian pedagogian renkontiĝon en Broc/FR sub la aŭspicio de la Freinet-movado, en kiu partoprenis ankaŭ e-istoj.

Unu el la signifaj pionirinoj de la reformita kaj alternativa lernejo en Romandio nomiĝis *Marguerite Bosserdet* (1886-1967). Ŝiaj eksperimentoj kun alternativaj instruformoj en la lernejoj kondukis al la starigo de la Nova Lernejo Ecole nouvelle des Terreaux (Neuchâtel 1929-39). Ŝiajn ideojn bonvenigis famaj pedagogoj kaj psikologoj, krom Freinet ankaŭ Ovide Decroly (1871-1932), Adolphe Ferrières (1879-1960), kiu estis e-isto, Jean Piaget (1896-1980), kunlaboranto de →Pierre Bovet de la Instituto Jean-Jacques Rousseau en Ĝenevo, kaj Alice Descœudres (1877-1963), kiu verkis pri Zamenhof en unu el siaj libroj. Do tra unu aŭ alia kanalo la nomitaj pedagogoj eksciis pri Eo. La privata lernejo *La Grande Ourse* (fond. 1983) en La Chaux-de-Fonds, kiu estas inspirata de la pedagogiaj ideoj de Freinet kaj Bosserdet, ofertas en sia instruprogramo ankaŭ la lingvon Eo. Ĝia direktorino Véra Zaslavsky, kies familio rilatis kun Edmond Privat, mem scipovas Eon.

En 1958 dekkvar e-istoj el diversaj landopartoj fondis en Biel-Bienne la organizon *Esperanto-Edukistaro de Svislando EES*. Ĉi tiu asocio sekve organizis diversajn aranĝojn (→Instruado de Eo en Svislando). Freŝajn akcentojn donis ankaŭ la prelegvojaĝo de la japana sociologo kaj ĵurnalistino Joŝiko Kaĵino (*1929) tra Svislando en 1959, kiu estis organizita de SES. Ŝiaj prelegoj pri Japanio kaj Eo estis tradukitaj nacilingven de spertaj Eokolegoj kaj efektiviĝis antaŭ sufiĉe grandaj neesperantistaj publikoj en Zuriko, Vevey, Biel-Bienne, Bazelo, La Sagne/NE, Winterthur, St. Gallen, Herisau, Langenthal, Erstfeld, Aarau, Romanshorn, Berno, Neuchâtel, Laŭzano kaj Ĝenevo. La gazetaro pozitive eĥis pri tiu prelegaro. Mallonge post Kaĵino vizitis Svislandon alia japano, Eizo Ito, direktoro de la japana religia movado Oomoto, kiu prezentis sin en pluraj urboj de Romandio kaj Alemanio. En 1963 sekvis la svisa vizito de du aliaj konataj kaj junaj samideanoj el Japanio, Kĵotaro Deguĉi (Oomoto) kaj Joŝimi Umeda (TEJO).

En 1959, la Eo-fervojistoj de SAEF organizis la unuan *Eŭropan Ferian Semajnon*, turisman aranĝon kun kleriga kaj distra celoj. Ĝi okazis regule kaj sukcese ĝis 1977 precipe en Alemanio kaj Tiĉino kaj estis organizita

grandparte de →*Hans Hunkeler*, →*Ernst Glättli*, →*Paul Bächli* kaj →*Fritz Liechti*. (→Fervojistoj)



Joŝiko Kaĵino, Eizo Ito kaj Joŝimi Umeda – gastoj el Japanio vizitis Svislandon



Joŝiko Kaĵino

La centjara jubileo de la naskiĝo de L.L. Zamenhof en 1959 estis festata per diversaj manifestacioj en Biel-Bienne, Bazelo, Zuriko, Neuchâtel, Berno, Interlaken, Frutigen, Flims, Konolfingen ktp. Tiuokaze aperis pli ol 300 artikoloj pri Eo en la nacilingva gazetaro.



Hans Hunkeler, Paul Bächli kaj Ernst Glättli

1960aj jaroj: Post la zamenhofa jubileo en 1959 atendis la e-istojn la festado de la 75-jariĝo de la lingvo Eo en 1962. La samjaraj Eo-tagoj en Berno estis dediĉitaj al Edmond Privat (1889-1962), kiu forpasis en tiu jaro same kiel →*Charles Ecabert* (1913-62), instruisto en Neuchâtel, kiu iom antaŭe fariĝis la nova Eo-parolisto ĉe Svisa Radio Interna-

cia. Pli granda manifestacio omaĝe al Privat kaj Ecabert okazis en novembro 1963 en la aŭditorio de la neŭŝatela universitato.

Dank' al iu speciala fonduso povis esti produktita Eo-ŝtampo uzata de la svisa poŝto. Krome la direktoro de la Trafikmuzeo en Lucerno, montrante sian plezuron pri Eo, disponigis al la e-istoj konstantan lokon en formo de varbafiŝa standeto, kiu estis inaŭgurita en 1964. En Tiĉino la Eo-movado estis reprezentita dum la kongreso de la eŭropaj federalistoj.

Post kiam la Eo-organizaĵoj stabiliĝis en la german- kaj franclingva partoj de Svislando, 'verdaj ĝermoj' pli kaj pli aperis ankaŭ en itallingva Tiĉino. La kerno de la poresperanta agado en Tiĉino fakte troviĝis en la fervojista medio. Rezulte de la 7a IFEF-kongreso en 1955 en Zuriko ekde tiu periodo aktivadis en tiu suda kanton fervojista EG ĉirkaŭ *Giovanni Sasselli* (1904-72), *Enea Albertini* (1926-90), *Fernando de Faveri* (1926-2004) kaj →*Kurt Greutert* (*1927). Tiu agado kondukis al la fondo de la EG Bellinzona kaj de Tiĉina Eo-Ligo (TEL) mem en 1961. Ĝia unua prezidanto fariĝis *Enrico Balmelli* (*1917), emerita lokomotivestro kaj iama tiĉina politikisto. Kiel Balmelli ankaŭ *Edo Tognini* (*1927) en Bellinzona estis politika aktivulo. Kiel iama multjara fervoj-personara sindikatisto kaj emerita bankdirektoro, Tognini membris, kiel cetere ankaŭ de Faveri, en la bellinzona urba konsilio kaj sidis en la tiĉina kantona parlamento.



Enrico Balmelli, Edo Tognini kaj Kurt Greutert

Al la tiĉina Eo-movado aliĝis en 1960 ankaŭ la juna liceano →*Tazio Carlevaro* (*1945), kiu fariĝis renoma psikiatro en Tiĉino kaj internacie respektata esperantologo. Kiel posta prezidanto de TEL, Carlevaro transprenis la taskon kunordigi la Kulturajn Semajnfinojn E-istan en Lugano, kies tradicio daŭris de 1974. Meze de la 70aj jaroj TEL registris ĉ. 120 membrojn kaj simpatiantojn. La Eo-

aranĝoj en Tiĉino allogis krom svisoj ankaŭ samideanojn el najbara Italio. (→Tiĉino)

Alia signifa e-isto el Tiĉino, →*Dante Bertolini* (1911-98), estis publike ne malpli respektata kiel instruisto, lerneja inspektoro, politikisto kaj itallingva verkisto. Kiel vicprezidanto de la loka Eo-organizo GRESLO en Locarno Bertolini instruadis Eon en diversaj lernejoj, jen por infanoj, jen por plenkreskuloj.



Tazio Carlevaro kaj Dante Bertolini

1963 eniris la historion kiel jaro de la unua *trilanda renkontiĝo* de la svisaj, sudgermanaj kaj aŭstraj e-istoj en la vorarlberga ĉefurbo Bregenz, en ĉeesto de 60 personoj kaj de unu reprezentanto el Lihtenŝtejno. La trilanda renkontiĝo de 1964 okazis en Lindau (Bavario). Apartan atenton vekis la sekva trilanda renkontiĝo en Romanshorn en 1965 pro la inaŭguro de la strato *Esperanto-Weg* ĉe la loĝadreso de Otto Walder (→Stratoj). Alia trilanda renkontiĝo okazis en 1966 en Bazelo. La sama aranĝo estis reorganizita en la 70aj jaroj.

En 1968 Claude Gacond konstatis, ke la krizo de la Eo-grupoj konstante graviĝas. La grupoj ŝatus okazigi kursojn, sed neniu kuraĝas gvidi la lecionojn. Ili ŝatus aranĝi interesajn prelegojn, sed neniu trovas la tempon por la pretiĝo de tiuj aranĝoj (laŭ la fondkunvena protokolo de KCE). En urboj kiel ekzemple Biel-Bienne au Fribourg tute ne ekzistis EG.

Tial la fondo de →*Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI)*, statute oficialigita en 1967 kadre de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, kaj la konstruado de →*Kultura Centro Esperantista (KCE)* ekde 1968 estis gravaj paŝoj antaŭen kaj konsidereblaj kiel kulminoj iusence konkludaj en la ĝisnuna evoluo de la svisa Eo-movado. Per tiuj kuraĝaj iniciatoj de →*Claude Gacond* (*1931) kaj ties kunlaborantoj

→ *August Braun* (1915-85), → *René-William Perrenoud* (1904-96) k.a., la Eo-publiko ricevis novajn okazojn pli altnivele aktiviĝi sur la kultura kaj scienca kampoj. CDELI, kies komencoj reiras en la 1950ajn jarojn, celis la kunlaboron krom kun la e-istoj ankaŭ kun reprezentantoj de aliaj planlingvoj, kiuj estis alvokataj anstataŭ forĵeti, havigi siajn ne plu bezonatajn dokumentaĵojn al tiu planlingva arkivejo, instituciiginta sine de signifa urba instanco.

'Parencoj' de Eo: Pro sia universaleca, humanisma kaj pacama karakteroj, la Eo-movado ĉiam altiris ankaŭ homojn el ideologie kvazaŭ 'parencaj' aŭ almenaŭ 'najbaraj' movadoj. Inter tiuj troviĝis – kaj en unuopaj kazoj daŭre troviĝas - ekzemple la naturamiko, fervojistoj, laboristoj, religiemuloj ĉiuspecaj, do kristanoj, bahaanoj, kvakeroj, ateistoj, spiritualistoj, bontemplanoj, civilservistoj, framasonoj, vegetaranoj, kontraŭalkoholistoj, pacaktivuloj kaj kontraŭmilitistoj, politikemuloj diversaj, filozofoj, socialistoj, komunistoj kaj kontraŭkomunistoj, blinduloj, lingvistoj, literaturistoj, ĵurnalistoj, instruistoj-pedagogoj, didaktikistoj, etnistoj, kooperativanoj, sindikalistoj, mondfederistoj kaj mondcivitanoj, sed ankaŭ komercistoj, skoltaj, biciklistoj, naturistoj, radioamatoroj, filantropoj k.a. Fakte anoj el la menciitaj movadoj fariĝis vervaj adeptoj de Eo aŭ de aliaj planlingvoj. Iuj estis fervoraj apogantoj de la eŭropa movado, aliaj subtenis la Moralane Re-Armadon aŭ propagandis la doktrinon de la libera ekonomio de Silvio Gesell (1862-1930) aŭ adoris alian filozofion kiel tiun de la pedagogo Paulus Geheeb (1870-1961), iniciatinto de Odenwaldschule kaj mem praktikanto de Eo. Denove aliaj estas adeptoj de la modera minuskligo de la germana ortografio. Cetere inter la e-istoj troviĝas ankaŭ anoj de diversaj politikaj partioj, socialdemokrata, liberala, kristana, komunistaj aŭ alia. La interkontaktoj de la e-istoj kun anoj de aliaj idealismaj kaj filantropiaj movadoj, kaj inverse, ne malofte kaŭzis utilajn sinergiojn. Jen kelkaj ekzemploj:

→ *Marc Rohrbach* (1904-93), la fondinto de la movado J.E.A.N. (=Juneco spirita, Edukado de si mem, Ardo en laboro, Nobelego kondukta), lernis Eon kaj evoluigis la t.n. Rikan metodon por efektiviigi la pedagogiajn celojn de sia organizo cele al la kultivado de la logika pensado. Pluraj romandaj e-istoj adoptis la filozofion de Rohrbach. Precipe *Lucienne*

Dovat-Clément (*1919) aplikis la Rikan metodon en lingvokursoj de KCE kaj aliloke. (→ Instruado de Eo en Svislando)

La internacie konata pacaktivulo *Jacques Mühlethaler* (1918-94), ĉefa motoro de la Monda Asocio por la lernejo kiel pacinstrumento (EIP) en Ĝenevo, konstatis en la zamenhofa homaranismo paralelon de siaj porpacaj konsideroj kaj ekinteresiĝis pri Eo. Tial li iom kunlaboris kun KCE kaj kontribuis al la distribuo de Eo-libroj tra svisaj librovendejoj.

Varman akcepton tiuj e-istoj, kiuj rifuzis la armean deĵoron, trovis ĉe *Pierre Céréssole* (1879-1945), la fondinto de la → Civilservo Internacia, kun kiu estis ligita ne nur Edmond Privat, sed kie deĵoris pluraj e-istoj.



Jacques Muhlethaler, Marc Rohrbach kaj Pierre Céréssole

Ofte en la historio de la svisa Eo-movado aperis diversaj personecoj, kiuj sen fariĝi viglaj movadanoj aŭ sen flue scipovi la lingvon Eo tre interesiĝis pri Eo, varme subtenante la ideojn de L.L. Zamenhof, ĉu per la disponigo de siaj fakaj konoj kaj kapabloj, ĉu per mecenado, ĉu per kontribuado sur scienca aŭ ĵurnalisma kampoj.

Ĉar multaj e-istoj apartenis/as al diversaj ideologiaj kaj politikaj tendencoj, povis okazi, ke la rilatoj inter ili tial ne ĉiam estis harmoniaj. Ekzemple en Ĝenevo kaj Laŭzano ekzistis siatempe pluraj Eo-organizoj, ekzemple laborista kaj neŭtrala, kiuj komencis normale rilati unu kun la aliaj nur kiam ili ekkomprenis, ke ne havas sencon eviti unu la alian pro ideologiaj motivoj, ke unuope ili estas tro malfortaj kaj ke necesas unuiĝi. Kompreneble ankaŭ generaciaj kaj mentalecaj, lingvaj kaj kulturaj diferencoj ludis rolon. Ĉi tiuj ideologiaj kaj sociaj aspektoj de la Eo-movado ne estas tre konataj kaj indus esti esplorataj pli profunde (ekzemple laŭ privataj korespondaĵoj).

1970aj jaroj: Iom samdirekte kiel la jam ekzistanta Eo-Kulturdomo Kastelo Grésillon en Francio, Kultura Centro E-ista kaj ties

Internacia Feria Altlernejo (IFA) en La Chaux-de-Fonds celis la kulturalan pliklerigon de novaj kaj malnovaj Eo-parolantoj, sed ankaŭ strebis akceli la oficialan agnoskon de la Eo-instruado, se ne en tuta Svislando, do almenaŭ en la neŭŝatela kantono, kie KCE rezidis. Kiel ankaŭ en la kazo de multaj aliaj temoj, en Svislando la lernejoj apartenas al la kompetencoj de la kantonoj. La koncepto de KCE kaj la programo de IFA ja trovis vastan aprobon precipe en la romanda parto de Svislando, kie laŭ tradicio la homoj ŝajne estas pli apertaj al kultura internaciismo ol en Germanio. Aliflanke multaj (alemanaj) e-istoj restis iom skeptikaj pri la planoj kaj agadoj en la por ili iom fora Neŭŝatela Ĵuraso. Estraranoj kaj membroj de SES evidente ankoraŭ ne sentis sin sufiĉe maturaj por reale akcepti tiajn defiajn projektojn kiel KCE/GEP kaj preferis koncentriĝi je la propra modesta laboro societa. Ĝi ja tute ne ekskludis kulturajn aktivecojn kaj ankaŭ ne malebligis la kunlaboron kun KCE. Tiel la tradicio de la kulturaj kunvenoj kiel ili okazis de jardekoj kadre de SES estis daŭrigata en formo de regionaj semajnfinoj. La laŭnatura devigo al komunaj agadoj inter SES kaj KCE multe kontribuis al la alproksimiĝo kaj kultura interŝanĝo inter alemanoj kaj romandoj, kiuj ne ĉiam havas la okazon viziti la alian landoparton. Tio certe estis bona. Kvankam la urbaj aŭtoritatoj apogis ĝin, la 'ĝenerala publiko' restis sufiĉe indiferenta, kaj la gazetaro konservis neŭtralan, bonvolan aŭ skeptikan sintenon al la Eo-projekto en La Chaux-de-Fonds. Fakte dank' al la ekzisto de KCE/IFA en la bela Neŭŝatela Ĵuraso sur 1000 metroj de alteco multaj e-istoj, svisaj kaj eksterlandaj, sentis sin altirataj de ĝiaj lingvoinstrua, kleriga, kultura kaj feria dimensioj. Tio kondukis al la neceso disponigi taŭgajn salonojn kaj tranoktejojn kaj per tio al la konstruado de konkreta hotela kaj gastro nomia infrastrukturo.

Tiucele en 1974 estis starigita → *Gastejo Edmond Privat (GEP)* kiel fondaĵo laŭ svisa leĝo. La kontrakto kun la urbo La Chaux-de-Fonds antaŭvidis la akiron de sep malnovaj domoj, kiujn la fondaĵo trovis en nordokcidenta kvartalo de la ĵurasa metropolo kaj kiujn ĝi aĉetis laŭtape de la komunumo je favora prezo.

La ekeksisto de KCE kaj GEP subite ŝanĝis la situacion de la svisa Eo-movado kaj la konscion de la svisaj e-istoj, ankaŭ sur faka kaj loka niveloj. La aktivuloj, kiuj ĝis nun agadis en EES, EJS kaj en la ĉaŭdefona EG,

integriĝis en la strukturoj de KCE/IFA/GEP kaj CDELI, la malnovajn organizojn anstataŭis nove lanĉitaj, sed principe samcelaj fakorganoj: la jam menciita *Internacia Feria Altlernejo (IFA)* estis destinita kiel somera universitato por la klerigema e-istaro; la *Komisiono Eo lernejen* lanĉis kampanjon por rilati kun edukinstancoj kaj politikaj aŭtoritatoj kaj por apliki la ideojn de ILEI-UEA en Svislando; la *Kultura Komisiono* de KCE servis kiel reto de fakaj konsilantoj, kaj la kampanjo *Pro Esperanto* utilis por la lingvopropagando kaj por kolekti monon.



Claude Gacond kaj August Braun

Dum la romandaj e-istoj ĝenerale preferis kaj favoris la disvolviĝon de la poresperanta agado sub la gvido de KCE en La Chaux-de-Fonds, en Germanio elkristaliĝis grupo de tre fervoraj aktivuloj, ĉefe el la SES- kaj SAEF-medioj, kiuj konsekvence iris sian propran vojon. Meze de la 1970aj jaroj en Svislando grupo de aktivuloj el SES ĉirkaŭ Heinrich Matzinger kaj s-ro Vontobel komencis, apud la KCE-strukturo L'espéranto à l'école, agadi kadre de memproklamita Svisa Eo-Lernejkomisiono kun la celo konvinki la svisajn lerneajn instancojn, ke estus tempo enkonduki la instruadon de Eo en la bazajn lernejojn, alternative aŭ paralele al la instruado de la nacilingvoj. Per la Alvoko *Aufruf an die Schweizerische Lehrerschaft*, kiu estis subskribita de la Centra Komitato de SES kaj sendita al la instrudepartementoj, al gravaj pedagogiaj instancoj kaj al porinstruistaj periodaĵoj de Svislando, oni enmiksiĝis en la oficialan lingvo-instrupolitikon de Svislando. La klopodoj devis komplete fiaski, ĉar la kampanjo estis entreprenita pro nekono aŭ misinterpreto de la svisa lingvopolitika realeco. → Tazio Carlevaro kritikegis la agadon de SES en *Monata Cirkulero* kiel diletanta kaj naiva kaj rakontis kiel sekve al sia plendo li rikoltis malagrablajn reagojn de tiuj aktivuloj,

kiuj ne volis kompreni, kial ilia agado ne povas sukcesi. (→Antologio)

Aliflanke la ege aprezinda celkonscienco de fervora grupo ĉirkaŭ →Kurt Greutert, →Ernst Glättli, →Erna Döring, Heinrich Ringli, →Lilly Schaerer, Johann Lutz, Gertrud Weigelt, François Mottet, →Hans Hunkeler, Martin Balsiger, István Mórocz k.a. kulminiĝis en la organizado kaj realigo de la 64a UK de UEA en Lucerno en 1979. 32 jarojn post la berna UK en 1947 do denove okazis Eomondkongreso en Svislando. La eldono de porokaza svisa Eo-poŝtmarko kaj la aperigo de la libro →*La Fenomeno Svislando* de →Arthur Baur donis akcentojn de prestiĝo al la plej grava dumjara manifestacio de la internacia Eo-movado. En la Svisa Nacia Biblioteko en Berno ree okazis ekspozicio pri Eo kaj interlingvistiko. De la 17a de junio ĝis la 5a de julio 1975 ankaŭ en la centra biblioteko de Zuriko estis prezentita ekspozicio pri Eo.



La fenomeno Svislando de Arthur Baur kaj la svisa Eo-poŝtmarko el 1979

1980aj jaroj: En 1980 →Arthur Baur pretis fariĝi prezidanto de SES. Dum la 80aj jaroj kelkaj SES-anoj, ekipitaj per verdstelaj ĉemizoj, partoprenis la tradician popolmarŝon, kiu estis ĉiujare organizita en la berna regiono dum du tagoj (→Bern). Alispecan manieron grandkvante atingi la publikon kaj informi ĝin pri Eo SES trovis en 1981, kiam estis presitaj kaj distribuataj, precipe en restoracioj, centmil telersubmetaĵoj el papero, kiuj enhavis klarigojn pri Eo.

La Eo-junularo reorganizigis sub la titolo *Junularo E-ista Svislanda (JES)* kaj la gvido de →*Dietrich Weidmann* (*1960). Dum la 80aj jaroj ĉi tiu verva Eo-aganto estis aktivulo de la maldekstra junulara protestmovado en Zuriko. Weidmann finis sian studadon pri germanistiko kaj lingvoscienco en la zurika universitato per licencia verko traktanta inter-

lingvistikan temon. Li estis inter la unuaj en Svislando, kiuj uzadis interreton por esperantaj celoj. Iom poste sekvis lian ekzemplon la slavisto →*Andreas (Andy) Künzli* (*1962), e-isto de 1979, kiu verkis por la sama universitato licencian verkon pri la historio de interlingvistiko kaj Eo en Ruslando, kie li studcele restadis dum du semestroj (1988-89). En 1992 li komencis kolekti la materialon por ĉi tiu enciklopedio. Tre specialan vojon iris la Eo-propagandisto →*Serge Reverdin* (*1942), kiu sub la pseŭdonomo „Reĝo Parzival“ kaj precipe en la regiono de Biel-Bienne kaj Ĝenevo varbadis por Eo en maniero, kiu ne ĉiam plaĉis al la seriozaj e-istoj.

Aliaj gravaj agadoj estis en tiu periodo la SAT-kongreso en Bazelo (1981) kaj la inaŭguro de la bieno →*Sunhejmo* en Rheineck/SG (1981) kiel Eo-centro sub la gvido de Hans Kästli, sed ankaŭ la efektivigo de la 13a Trilanda Renkontiĝo en Romanshorn (1982) kaj la starigo de *Informcentro pri Eo* en Ĝenevo (1982) far →*Andres Bickel* (*1954) k.a. La agadon de tiu centro partoprenis ankaŭ →*Claude Piron* (*1931), internacie konata e-isto belgdevena, kiu 1956-61 funkciis ĉe UN en Novjorko kiel tradukisto kaj 1961-71 kiel dungito de Monda Organizo pri sano en Ĝenevo; poste li komencis labori kiel psikologo, psikanalizisto kaj psikoterapiisto. En Eomedioj Piron fariĝis konata kiel aŭtoro de Eolegolibroj kaj krimromanoj, kiel analizanto de la psikologiaj reagoj al Eo kaj kiel arda defendanto de la avantaĝoj de la zamenhofa lingvo. (→Antologio)

Charlotte Ecklin, membrino de Lucerna Eo-Societo, sendis en 1981 leteron al la tiama prezidanto de la Svisa Konfederacio, d-ro Kurt Furgler, kun la sugesto, ke oni enkonduku Eon almenaŭ kiel libervolan fakon en la lernejojn. Kompreneble la respondo de la Departemento pri justico kaj polico devis esti negativa. Kun la atentigo pri la koncernaj lingvaj paragrafoj de la svisa konstitucio, kiuj antaŭvidas, ke ĉiuj klopodoj estas koncentritaj je la subteno kaj akcelo de la germana, franca, itala kaj romanĉa kiel naciaj lingvoj de Svislando, estis pridubata la dezirindeco de Eo kiel lingvo „sen vivanta kulturo“, kiu estas instruata en neniuj lernejoj de Svislando. Tiel tiu kaj aliaj similaj leteroj povis havi la statuson sole de opiniletero el la engaĝita publiko, kiu estis respondita afable kaj korekte, pro ofica devo, kaj bone ilustris la sinteton de svisaj aŭtoritatoj. (→Politiko)

En 1980 estis fondita *Kooperativo de Literatura Foiro (LF-koop)*, societo kun sidejo

jure registrita en Svislando. La unua numero de la samnoma revuo *Literatura Foiro (LF)* aperis longe antaŭ la fondo de la kooperativo, nome jam en 1970. Per la reĝisorado de →*Giorgio Silfer* (*1949), →*Perla Ari-Martinelli* (*1938) kaj →*Tazio Carlevaro* (*1945) LF-koop ekaktivis kiel nemalhavebla intelektuala opiniovado kun klerigaj funkcioj sur la literatura, kultura kaj interlingvistika kampoj, kiel organizanto de diversaj sciencaj aranĝoj kaj eldonanto de kulturaj produktoj kaj servoj. Inter 1981 kaj 1987 LF-koop eldonis ankaŭ la revuojn *Planlingvistiko*, *Lombarda E-isto* kaj *Transalpa E-isto*.

En 1985 en Tiĉino estis inaŭgurita nova *Eo-placo* en *Solduno*, kvartalo de Locarno, laŭ iniciato de EG Locarno. Per tio Svislando ricevis sian trian publikan Eo-lokon post Esperantoweg en Romanshorn kaj unu bushaltejo en La Chaux-de-Fonds, kiu portis la nomon de Eo. En 2002 la nomo de la placo en Solduno estis ŝanĝita laŭ la nomo de la e-isto kaj konata tiĉina pedagogo kaj verkisto →*Dante Bertolini*. (→Stratoj)



Claude Piron kaj Giorgio Silfer

Ekde 1986 sub la nova SES-prezidanto →*Claude Gacond* (*1931), kiu samtempe estis ankaŭ direktoro de KCE, estis enkondukitaj strukturaj reformoj en la organigramon de SES, inkluzive de ĉi-rilataj statutŝanĝoj. Kun la celo stimuli la pli fruktodonan diskutadon kaj pli koheran kunlaboradon inter la diversaj lokaj kaj fakaj Eo-grupoj, splititaj laŭ regionisma kaj kantonisma spirito ne ĉiam produktiva, estis starigita t.n. larĝigita CK, poste baptita Federa Konsilio de SES, al kiu aŭtomate apartenis la reprezentantoj de lokaj kaj fakaj EG kaj aliaj Eo-instalaĵoj en Svislando kun la rajto de po unu voĉo. Tiuj strukturaj reformoj postulis pli altnivelan laborenerĝion kaj la fizikan ĉeeston de ĉiuj envolvitoj, kio ne ĉiam estis plene garantiata kaj komen-

cis elĉerpiĝi en la lastaj jaroj de la prezido de Gacond.

La 100-jaran jubileon de Eo SES festis en 1987 per tri regionaj kulturaj semajnfinoj, per aktivecoj kun reprezentantoj de la amaskomunikiloj, i.a. okazis gazetara konferenco en Berno en la ĉeesto de reprezentanto de SRI, kaj aliaj agadetoj. La fest-etoson bedaŭrinde ĝenis tre malagraba SES-interna konflikto lige kun la t.n. 'elkongresa kapitalo' de la 64a UK, kiun la estraro de SES deziris malbloki por investi la monon en konkretaj jubileaj projektoj. Feliĉe la problemo povis esti pace solvita, tamen ne sen ekskludo de unu SES-membro. (→Svisa Eo-Societo)

1990aj jaroj kaj ekde la jaro 2000: Komence de la 1990aj jaroj la gvida kaj financa krizoj de KCE/GEP akriĝis, kio signifis, ke oni devis vendi la domaron de GEP, kies infrastrukturon oni antaŭe multekoste renovigis. Dum la fondumo GEP mem estis likvidita, en ĉi tiu reorganiza procezo KCE daŭrigis sian ekziston kiel memstara asocio sub alies gvidado. En la dua duono de la 90aj jaroj la centro perdis pli kaj pli de siaj originaj fortoj kaj signifo. (→KCE, →GEP)



Dietrich Weidmann, Andreas Bickel kaj Andreas Künzli

En printempo 1990 SES decidis ĉesigi la eldonadon de *Svisa Esperanto-Revuo* pro manko de disponebla redaktoro kaj lanĉi internan societatan informilon kun la titolo *Svisa Eo-Societo informas*. En la kotizo estis inkluzivita ankaŭ la ricevo de la revuo *Literatura Foiro* (1991-2001).

Grava bato por la Eo-movado estis la ĉesigo de la produktado de la Eo-elsendoj de Svisa Radio Internacia (Berno) fine de marto 1992 lige kun la reorganizado de tiu radiostacio.

Ĝuste en tiu tempo ekaktualis ankaŭ la diskuto pri la ideoj, celoj kaj agadoj de la →*Esperanta Civito*, kiun Silfer iniciatis. Sed nur malmultaj svisaj e-istoj trovis tiun ideon bona.

Kiel daŭrigo de la tradicio inviti eksterlandajn e-istojn, en 1990 kaj 1991 Svislandon vizitis d-ro Erich-Dieter Krause, eksa GDR-ano kaj aŭtoro de la grava vortaro Esperanto-Deutsch (eld. 1983), per prelego en diversaj Eo-societoj.

La 28an de aprilo 1998 okazis en la Palaco de Nacioj en Ĝenevo datrevena simpozio de UEA pri la temo 'Lingvo kaj Homaj Rajtoj', sub la aŭspicio de UN-Komisiono pri Homaj Rajtoj (UNCHR) (vd. *Esperanto*, junio 1998). (→Universala Esperanto-Asocio)

Kvankam lastatempe la laŭstatuta jarkunveno de SES estas partoprenata de relative malmultaj voĉdonrajtaj SES-membroj kaj malgraŭ tio, ke pluraj lokaj kaj fakaj EG estas minacataj de elĉerpiĝo aŭ jam malaperis (kiel TEL/1997, SKUE/2002 kaj SAEF/2004), la 100-jara jubileo de SES povis kun centoj da partoprenantoj digne okazi la 27an de septembro 2003 en Laŭzano kaj Rolle/VD, kie SES estis fondita unu jarcenton antaŭe. En 2004 sekvis aliaj sukcesaj festkunvenoj lige kun la 100-jara jubileo de SES, pri kiuj la bulteno *Svisa Eo-Societo informas*, modele produktata de Claude Gacond laŭ ties ebloj, la ĉefa organizinto de la jubileaj aranĝoj, interese raportis. (→Svisa Eo-Societo)

Demografia enketo de 1994-96

En *demografia enketo*, realigita de →Tazio Carlevaro de 1994 al 1996 surbaze de 311 anonimaj demandiloj inter svisaj e-istoj, la profesia medicinisto-psikiatro kaj hobia interlingvisto venis al kelkaj interesaj konkludoj.

Rilate la sekson, la svisa Eo-movado reprezentas 52% de viroj kaj 48% de virinoj. Se konsideri la pensian aĝon inter 62 kaj 65 jaroj, kiu validas en Svislando, 43,6% de la enketitoj estis emeritoj; kun ĉiuj ceteraj emeritiĝintaj personoj la procentaĵo estis 56,4.

Koncerne la lernejan nivelon, surbaze de 145 respondintoj estis malkovrite, ke 33,% disponas diplomon de baza aŭ profesia lernejo kaj 66,1% eĉ frekventis superan lernejon aŭ universitaton. El 182 respondoj evidentiĝis 23 dommastrinoj (12,6%), 71 dungitoj (39%) kaj aliaj profesioj (kiel kuracistoj, profesoroj kaj advokatoj 25, t.e. 13,7%. Nur 26% de la enketitoj vivis en grandurboj.

Do eblas konkludi, ke la Eo-komunumo en Svislando estas iom maljuniĝanta aŭ eksjuna, pli ol averaĝe klera, kaj ke la plimulto preferas vivi ne en la plej grandaj urboj, sed en pli mezgrandaj urboj.

Plue en tiu enketo 99 el 157 respondintoj indikis, ke ilin plej interesas lingvoj, sekvate de muziko (75 mencioj), literaturo (72), religio (56), historio (54), ekologio (44), dum natursciencoj praktike mankis. Do multaj e-istoj estas kulture interesataj kaj socie aktivaj civitanoj. Ĉar la plej granda parto de la respondintoj (134 aŭ 85.5%) havas klarajn politikajn konvinkojn kaj 121 aŭ 70% eĉ partoprenas en voĉdonoj, eblas konkludi, ke la e-istoj estas modelaj civitanoj kaj diverĝas de la averaĝa sviso, kiu ne multe interesiĝas pri politiko.

Dum la plimultaj e-istoj apartenas al unu el la lingvokomunumoj de Svislando (germana, franca, itala), parto de la e-istoj estas dulingva, kaj romanĉlingvaj e-istoj forestas. La plej granda parto de la dulingvuloj parolas du 'svisajn' lingvojn (ĉefe la germanan kaj francan, poste italan). 10% parolas ankaŭ 'nesvisan' lingvon. Sed el 130 respondintoj evidentiĝis, ke pli ol la duono de la svisaj e-istoj utiligas nur unu solan lingvon en sia profesio. La germana estis la plej utiligata (38%), kio estas surprizo, ĉar la procentaĵo de germanlingvanoj en Svislando estas preskaŭ 64. La resto koncernis la francan (25,6%, italan (14,5%) kaj anglan (10,3%). Post la angla estis menciita ankaŭ Eo. 44,7% el la respondintoj scipovis nur du 'fremd'-lingvojn, kiujn

la lernejo proponas; 55,3% konis tri aŭ pliajn. Alta estas la nivelo de migrado inter la diversaj lingvoregionoj.

Koncerne la e-istecon de la respondintoj 58,5% respondis, ke ili lernis Eon en la periodo post 1970. Granda parto indikis, ke oni lernis Eon dum la lastaj 2-3 jaroj. 72,8% (107) de la e-istaro havis aĝon ĝis 39 jaroj, la resto estas pli maljuna ol 40.

La interesiĝo pri Eo povas koncerni la tutan familion: 52% el la geedzoj scipovis Eon kaj 25% el la gefiloj.

Rilate la nivelon de la scipovo de Eo ŝajnas, ke por la plimulto Eo estas pli facila en la pasiva uzado (t.e. legado, aŭda kompreno), dum la scipovo en aktiva uzado (skribado, parolado) estas pli komplika (supozeble tiu observo validas ankaŭ por la nacilingvoj). En la jaro antaŭ la enketo 88 personoj aĉetis minimume unu libron kaj 100 abonis minimume unu Eo-periodaĵon.

El 157 respondintoj 106 aŭ 67,5% apartenis al lokaj Eo-grupoj, dum 89 aŭ 56,7% aliĝis ankaŭ al SES (aŭ alia asocio kiel SAEF). Nur 82 aŭ 52,2% estis membroj de UEA aŭ SAT. Ŝajnas do, ke la grupa vivo estas esenca por la lojaleco de la e-istoj al la Eo-movado kaj entute por la pluvivo de la lingvo.

Konklude oni rimarkis, ke la rezultoj el tiu svisa enketo ne aparte diferenciĝis de tiuj, kiujn oni rikoltis el enketo pri la brita kaj germana Eo-movadoj, realigitaj en 1982 resp. 1996. Oni konsideras, ke la svisaj e-istoj estas pli poliglota ol la germanaj, sed tiu trajto karakterizas ankaŭ la svisojn ĝenerale, kompare kun alilandaj loĝantoj.

Iusence la svisa Eo-movado korespondas al speco de diasporo, kies anoj vivas en mezgrandaj urboj. Laŭ Carlevaro la Eo-movado povas esti difinita kiel kultura kaj etika movado, *kun* lingvo.

Ekzistas homoj, kiuj aliĝis al la movada vivo, ĉar ili subtenas la esperantan idearon, sed kiuj ne tre bone konas la lingvon. Ĝuste ilin necesus utile integri en la Eo-parolkomunumon.